

# KOMITATO-KUNSIDO

dimanĉon la 29-an de januaro 2023

## 0.1. Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj

Dimanĉon la 29-an de januaro 2023, de la 10a ĝis la 16a30 kunsidis parte rete kaj parte ĉeeste la Komitato de Esperanto-France.

[ĉeestas: S = surloke en la kongresejo, R = rete pere de Zoom]

PERSONA NOMO	FAMILIA NOMO	MALLONG.	KOMITATANECO	ĈEESTAS	SENKULP.	FORESTAS	RAJTIGAS
Michèle	ABADA-SIMON	MAS	Repr. de la membraro			x	
Bernard	CORNEVIN	BC	Repr. de la membraro			X	
Bruno	FLOCHON	BF	Repr. de la membraro	S			
Maurice	JUY	MJ	Repr. de la membraro	R			
Aleks	KADAR	AK	Repr. de la membraro	S			
Michaël-Boris	MANDIROLA	MBM	Repr. de la membraro	S			
Jean-Lucien	MAZEAU	JLM	Repr. de la membraro			X	
Christine	RAIFFAUD	CR	Repr. de la membraro		X		ER
Emmanuelle	RICHARD	ER	Repr. de la membraro	S			
Axel	ROUSSEAU	AR	Repr. de la membraro	S			
Gilles	TABARD	GT	Repr. de la membraro	S			
Paul	QUEVY-LEFEVRE	PQL	Repr. de la membraro	R			
Jean-Luc	THIBIAS	GS	Repr. de fed. France-Est		X		
Pierre	GAUTHIER	PG	Repr. de fed. Paris-Île-de-France	S			
Clair	MAHÉ	CM	Repr. de fed. Limousin	R			
Michel	DECHY	MD	Repr. de fed. Nord			X	
Laurent	PEUCH	LP	Repr. de fed. Bretagne	R			
			Repr. de fed. Poitou-Charentes				
Renée	TRIOLE	RT	Repr. de fed. Provence	S			
			Repr. de FET				
			Repr. de FKEA				
Didier	JANOT	DJ	Repr. de GEE / ÎLEÎ-Francio	S			
Rémi	DENEU	RD	Repr. de fed. Auvergne			X	
Inès	KAHIN	CB	Repr. de JEFO		x		

13 komitatoj ĉeestas el 21 – 3 senkulpigis, el kiuj neniuj donis povon.

Laurent ĉeestas matene kaj donas povon à Bruno por la posttagmezo

Axel alvenas je la 11a. Maurice ĉeestas posttagmeze.

Bruno prezidas

Emmanuelle protokolas

0.1 <b>Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj</b>	05 min
0.2 <b>Elektio de prezidanto kaj protokolanto</b>	05 min
0.3 <b>Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj</b>	05 min
0.4 <b>Dato de la venonta kunsido</b>	05 min

En Lyon sabaton la 6-an de majo, de la 14-a ĝis la 16-a  
lundon la 8-an de majo, de le 14-a ĝis la 16-a

## 1. **KUNORDIGO (administrado kaj financoj)**

### 1.1 **Financa stato, purigado de la kontoj** **INFORMO** 15 min (PQ)

Paul prezentas la financon (2022-2023 = Buĝeto):

DÉPENSES	2020-2021	2021-2022	2022-2023	RECETTES	2020-2021	2021-2022	2022-2023
<b>Kunordigo</b>	66 479 €	77 287 €	52 780 €		47 621 €	62 971 €	39 530 €
<b>Konsciigo</b>	7 822 €	2 063 €	2 500 €		6 053 €	1 180 €	1 000 €
<b>Komonumo</b>	39 912 €	36 807 €	31 500 €		30 802 €	40 346 €	36 250 €
<b>Kapablo</b>	2 012 €	1 380 €	3 000 €		2 012 €	1 380 €	3 000 €
<b>Total dépenses</b>	<b>116 225 €</b>	<b>117 537 €</b>	<b>89 780 €</b>	<b>Total recettes</b>	<b>86 488 €</b>	<b>105 877 €</b>	<b>79 780 €</b>
				<b>Résultat (Perte)</b>	29 737 €	11 660 €	10 000 €

#### **Sistemo de repago de kotizoj**

Pri la francilia federacio, Pierre Gauthier diras, ke post la ŝanĝo de la kotizoj, ni devus ŝanĝi la parton de la repago, kiun ni donas al la federacio, ĉar antaŭe estis 10%. Francilio decidu pri la parto de la kotizo, kiun ili volas ricevi de Esperanto-France. Nur la parto kiun Esperanto-France postulas ricevi estas fiksita (30€/12€).

### 1.2 **Raporto de la laborgrupoj** **INFORMO** 10 min

#### **Civita Servo.**

Ni diskutis pri diversaj aspektoj, kun homoj, kiuj jam spertis tiun sistemon, inter alie Inès kaj Michael Boris. Ankaŭ Marion Quenut multe laboris kun volontuloj en la kadro de la programo "civita servo".

Demandoj estas:

- kiujn taskojn ni povus proponi al tia volontulo (en la leĝa kadro) ?
- kiu povus superrigardi la dungiton ?

Laŭ la sperto de Tuluzo, indas dungi du volontulojn samtempe, por 16 horoj semajne.

Unua paŝo en la laboro de la dungitaj volontuloj certe estos lerni Esperanton. Povas esti problemo por loĝigi la volontulojn. Volontulo povas esti samtempe studanto aŭ havi alian laboron, kaj tio povas kaŭzi problemon pri disponebleco.

Estos reta kunveno pri tiu temo la 7-an de februaro je la 20a30, kun Marion.

#### **Kotizo de JEFO**

Kunveno kun Inès.

De pluraj jaroj ne estis ŝanĝoj. Plie estas miskomprenoj ĉar estas pluraj eblecoj kaj la nuna sistemo estas malfacila. Ni klarigis la situacion al JEFO kaj ni atendos respondon de JEFO kaj parolos denove pri tiu temo dum la venonta KK en majo.

## 2. KONSCIIGO projektoj, (ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

### 2.1 Nova logobildo de Espéranto-France

INFORMO 10 min

Ĝis nun unu kandidato (Marianne Trintzius) proponis sin por labori pri tiu projekto, sed ni ne plu havis novaĵojn kaj indus havi aliajn proponojn.

De kelka tempo la klubo de Tuluzo havas laborgrupon, en kiu partoprenas grafikisto, por renovigi sian logobildon. Ni vidu ĉu eblos reuzi ilian bazon por nia bezono.

Ebleco estas proponi studprojekton al lernejoj pri informado aŭ grafikarto.

### 2.2 Agado en UNO kaj Unesko

INFORMO 10 min

Vidu dokumentojn en la dosierujo [agado-UEA-UNO-UNESKO](#)

Barbara Despiney deziras ĉesi sian agadon ĉe Unesko. Nun plu estas François Lo Jacomo kaj Didier Loison. Laure Patas d'Illiers akceptis la taskon kaj UEA ĵus aprobis tion.

Ni bezonas, ke la grupo de intervenantoj ĉe UNESKO kunlaboru regule, interalie por la laboro pri multlingvismo.

### 2.3 Kampanjo Miyoshi

Tiu kampanjo ne estas la unua. Jam okazis inter 2003 kaj 2008, kaj tiam okazis diskutoj kun EF, sed "kiu pagas, tiu decidas", do ne vere estis ebleco diskuti. Ni scias, ke la frato de Miyoshi estas reklamisto, sed ne konas la okcidentajn kutimojn tiurilate.

Ni estis informitaj kelkajn tagojn antaŭ la anonco sed sen ebleco modifi ĝin. Ni sciis ke inter januaro kaj julio 2023, li okazigos reklamkampanjon por Esperanto en ĵurnaloj de Francio (*Le Monde* kaj *Les Échos*), Germanio (*Frankfurter Allgemeine*, *Süddeutsche Zeitung*, *Die Zeit*) kaj Pollando (*Gazeta Wyborcza*).

La unua reklamo estis publikigita la 27-an de januaro. Du aliaj tekstoj aperos poste, ĉiuj kun la jenaj ĉeftitoloj:

*EU jes; € jes; Esperanto ?*

*Daŭripova paco Esperante!*

*EU forigu la anglan dominadon.*

Propono de Axel : peti de la respondeculoj de *esperanto.net* ĉu la reklamo estigis pli da vizitoj.

Propono de MBM : kiam ni ekscias pri venonta apero de tia reklamo, ni pretigu nian retejon, por ke estu plej bonaj informoj. Same pri Vikipedio.

Notu, ke nia retejo jam havas informojn, facile troveblajn, pri kio estas Esperanto.

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

### 3.1 Le Monde de l'espéranto

INFORMO 5 min

Kontribuoj atendaĵaj !

Sendu artikolojn al [mondo@esperanto-france.org](mailto:mondo@esperanto-france.org)

Atentu pri apero en la butikoj estas anoncote ke LME estas 3-monata revuo

Eble povas sufiĉi aperigi la revuon unufoje jare por disdoni en budoj, bibliotekoj.

Neniu abonis pasintjare tra la butikoj.

### 3.2 Esperanto-Aktiv

Mankas homoj por proponi ideojn, verki artikolojn : ĉefa temo, libro (recenzo aŭ novaj aperoj)

La lasta numero aperis en novembro.

Demando: kiun publikon devas celi Esperanto Aktiv' kaj LME?

EA celas samtempe ne esperantistojn kaj esperantistojn.

En EA, rubrikoj pri okazaĵoj celas membrojn, kaj rubriko "Découvertes" pli celas eksteran publikon.

### 3.3 Stato de la projekto arkivo Sebert / Péraire

INFORMO 30 min

Pascal Dubourg-Glatigny (PDG) informas ke ĉiuj dokumentoj estis skanitaj (ĉ. 6000 skanitaj bildoj) sed nur parto registrita en la datumbazo. Restas laboro por tio kaj poste verki artikolojn, eble eĉ produkti dokument-filmon pri la 4-jara vojaĝo de Péraire tra la mondo per Esperanto. Fotistino venis vendrede en la sidejo por prepari afiŝon, kiu estas prezentota en 5 stacidomoj de Francilio por valorigi la esplorlaboron pri protekto de la kultura heredaĵo, pagitan de la francilia regiono. Inaŭguro okazos en aprilo. Ni ricevos invitilon por tio.

Resumo de la kunveno pri arĥivoj, kiu okazis en januaro, kun PDG. Multaj interesatoj (35 ĉeestis) kaj artikolo baldaŭ aperos por klarigi al esperantistoj, kion fari kun iliaj malnovaj libroj, dokumentoj kaj arĥivoj. Ankaŭ formularo estos proponata por listigi la materialojn. Claire Mousset-Declas konsentas ricevi la listojn kaj helpi esperantistojn recenzi arĥivojn kaj eldonaĵojn.

### 3.4 Statistikoj pri la butiko

INFORMO 05 min

En 2022, tra la reta butiko (prestashop), ni vendis 5400€ da varoj. La plej venditaj estas lernolibroj kaj vortaroj: *La Eta Princo*, *Metodo 11*, *Cahier d'exercices Assimil*, *Templo de l' suno*, *PIV*.

Renée diras, ke bedaŭrinde, kiam ŝi deziras aĉeti librojn freŝe aperitajn, ili ne disponeblas en la butiko. Tamen, kiam ni aĉetas novajn librojn, mulfoje ni devas aĉeti minimume 3 ekzemplerojn por malgrandigi la poŝtkostojn. Pro tio ni devas pli malpli certiĝi pri la vendado de la libro.

Propono: informi pri novaj libroj, ekzemple tra Esperanto-Aktiv.

### 3.5 Perado de abonoj

Renée ne ricevis la revuon *Literatura Foiro*. Ĉu Said povas kontroli la mendon ?

### 3.6 Projekto(j) de eldono de libro(j)

INFORMO 05 min

**Eldono de *Reĝo Ubuo* en la kolekto *Oriento-Okcidento*.** Nuna diskuto kun UEA, kiu malaprobas la antaŭparolon kiu ne sufiĉe montras la gravecon de la libro en la monda literaturo.

**Mil unuaj noktoj.** Tiu libro aperos ankaŭ en la serio *Oriento-Okcidento*. La teksto estas preta, kaj ankaŭ la antaŭparolo, verkita de Saïd. Ĉirkaŭ triono de la bildoj, kiuj ilustras la libron estas skanitaj. Ili venas de eldono de 1864, do temas pri bildoj libere uzablaj.

Demando: ĉu eblus eldoni alian albumon de Tinĉjo? (*La 7 kristalaj kugloj*)

Pri la antaŭaj albumoj zorgis Michel Dechy (buĝeto por unu eldono: ĉ. 20 000 €). La problemo estas, ke la eldonisto estas Casterman. Ni devas aĉeti 3000 ekzemplerojn al Casterman. Same por la aliaj libroservoj.

### 3.7 Kondiĉoj por vendi librojn al libroservoj, librovendejoj, kluboj

INFORMO 10 min

La specifaj kondiĉoj (rabatoj) koncernas nur la librojn, kiujn *Espéranto-France* eldonas. Ni proponas la jenajn regulojn:

- unuopuloj : 5% da rabato se pli ol 10 ekz.
- libroservoj\* aŭ profesiuloj : 15% por unu, 30% por pli ol 10 ekz
- aliaj asocioj : 5% por unu, 20% por pli ol 10 ekz

(\*) Libroservo estos organizaĵo, kiu havas butikon, fizikan aŭ retan katalogon kaj eldonas fakturon.

### 3.8 Kongreso 2023

INFORMO 05 min

La kongreso planita en Lyon por 2023 okazos de la 5-a ĝis la 9-a de majo 2023. La aliĝilo aperos venontsemajne.

### 3.9 Organizo de prelegvojaĝoj

INFORMO 05 min

Neniu novaĵo lastatempe pri eblaj kandidatoj por prelegi en Francio.

### 3.10 KoToPo

La asocio daŭre funkcias kaj ni havos pli precizajn novaĵojn fine de venonta semajno okaze de la vizito de Guillaume Lanier en Strasburgo.

## 4. KAPABLIGO (instruado kaj ekzamenoj)

### 4.1 KER-ekzamenoj

**INFORMO** 5 min

### 4.2 FEI-ekzamenoj

Renée: estas malfacile trovi homojn por organizi ekzamenojn. Principe devas esti minimume 3 personoj por organizi sesion.

### 4.3 MLA: stato de la projekto

**INFORMO** 5 min

Kiel varbi kaj trovi instruistojn?

Axel proponas demandi al tiuj, kiuj sekvas aŭ sekvis retajn kursojn, ĉu iuj estas instruistoj.

Emmanuelle preparos demandaron por sendi al tiuj, kiuj uzos la metodon, por scii, kiujn plibonigojn indas fari en la materialo.

DJ rimarkigas, ke la metodo estas kreita por 60 horoj da kurso, kaj ĝenerale sesio daŭras malpli

Bezono instrui Esperanton al instruistoj: itala projekto "30 ore d'oro - 30 oraj horoj".

Ĉefa problemo nun estas trovi instruistojn por uzi / taksi la metodon.

### 4.4 Reeldono de Metodo 12 ?

**DISKUTO** 10 min

**Unua etapo:** demandi al Robin kiom kostus la desegnoj. Axel demandos lin.

**Dua etapo:** decidi, ĉu ni eldonos la metodon.

Jen informoj transdonitaj al la komitato:

La *Metodo 12* tout comme la *Metodo 11* font partie des livres de notre fonds qui se vendent le mieux, régulièrement, et qui, de plus, sont dans la droite ligne de l'un des objectifs de l'association, qui est de promouvoir l'enseignement de l'espéranto.

Le stock actuel de *Metodo 12* sera épuisé dans 3 ans. Rééditer ce manuel est un projet qui demandera environ deux ans de travail. Il faut donc l'envisager dès maintenant si nous voulons avoir une nouvelle édition à proposer quand le stock sera épuisé.

Nous envisageons pour la nouvelle édition de la *Metodo 12* de procéder comme pour la *Metodo 11* : illustration et mise en page dans le même style, révision complète du contenu et contrôle par l'Académie.

Entre 2005 et 2017, nous vendions en moyenne 130 exemplaires par an de *Metodo 11*.

En janvier 2018, nous avons publié une nouvelle édition de *Metodo 11*, illustrée en couleurs et avec une nouvelle présentation. Les 1000 exemplaires imprimés ont été vendus en un peu plus de deux ans, dont deux tiers la première année.

En septembre 2020, nous avons publié une nouvelle édition de *Metodo 11*, entièrement révisée par l'académie d'espéranto.

Depuis 2018, nous vendons en moyenne 230 exemplaires par an, soit 77% de plus que pour l'ancienne édition de 2005.

L'édition de 2018 nous a coûté 4575 €, celle de 2020 nous a coûté 2515 €.

Les ventes de *Metodo 12* représentent environ la moitié (en nombre d'exemplaires vendus) de celles de la *Metodo 11*.

Tout comme pour la *Metodo 11*, on peut estimer qu'une nouvelle édition dopera les ventes et nous apportera deux tiers de ventes supplémentaires. Nous pourrions également proposer des offres groupées pour les deux volumes, ce qui nous permettra de doper un peu plus les ventes.

En ce qui concerne le budget, nous estimons la réalisation de toutes les illustrations à 3200 € et l'impression de 1000 exemplaires à 2800 €.

De 2018 à 2022, la vente de *Metodo 11* a généré un chiffre d'affaires de 10 000 €.

Il reste actuellement environ 500 exemplaires de *Metodo 11* en stock, ce qui représente un chiffre d'affaires supplémentaire à venir estimé à 4000 €.

On peut estimer que la nouvelle édition *Metodo 12* sera rentabilisée en quelques années, et cela d'autant plus si l'on tient compte de l'ensemble *Metodo 11 + Metodo 12*.